Novaj tekstoj kaj anoncoj por *inter-LIGILO* N-ro 3:98 estu ĉe la redaktantoj marde la 25-an de aŭgusto. La laborgrupo renkontiĝos la saman daton je la h.19.

÷ ÷ ÷

Ĉiumarde loka kunveno en nia klubejo je h.19.oo– 21.00. / **Varje tisdag sammanträde** i vår lokal kl.19– 21.00. Sommaruppehåll 16 juni–18 augusti.

÷ ÷ ÷

La estraro de Esperanto-Societo de Gotenburgo

Christer Lörnemark, prez.	031 – 41 26 53
Andreas Nordström, sekr	– 52 59 72
Anders Mellbratt, kasisto	– 29 52 78
Ralf Jalming, vicprez.	– 51 09 55
Göran Carlander, vicsekr.	– 12 21 53
Gertrud Brestan, anst.	– 46 91 76
Britta Rehm, anst.	– 41 02 56
Karl-Erik Peterson, turismaj aferoj	– 82 06 39
Gustav Larsson, bibliotekisto	– 53 72 29
Bo Sandelin, revizoro	– 91 85 54
Dolly Carlsson, revizoro	– 38 16 23
Sven Kärrefors, vicrevizoro	– 28 07 94

Membrogazeto de la Esperanto-Societo de Gotenburgo,

inter-LIGILO.

Ne-membroj povas aboni ĝin kontraŭ 40 kronoj. Skribu sur la poŝtĝira talono: "Por la inter-LIGILO".

Responda eldonanto: Christer Lörnemark, tfn 031-41 26 53 <Christer.Lornemark@gfs.gu.se>

Redaktantoj: Aira Kankkunen, Christer Lörnemark, Andreas Nordström, Inga Johanson

Esperanto-Centro de Gotenburgo
Masthuggsliden 1, **Se – 413 18 Göteborg**
Tfn 031-12 05 94 Poŝtĝira konto: 4 36 12-1

N-ro 2:98

inter-LIGILO

Esperanto

Printempa festo / Vårfest

kun komuna kantado
kaj aliaj programeroj
med allsång
och andra programpunkter

Knytkalas
Kunportu manĝaĵojn

marde / tisdag 26 majo 19.00
Esperanto-Centro, Masthuggsliden 1

Bonvenon!

Karaj Gelegantoj

La demandon pri mondkongreso (UK) en Gotenburgo ni ja iom diskutis en la societa estraro kaj en la estraro de la Esperanto-Alianco. Sed la diskuto ne estas finita, ni ne fine decidis, kaj ni, la estraranoj, ankaŭ volas ricevi pli da opinioj de la membroj pri la projekto. Ĉu estos ekzemple sufiĉe da volontuloj?

UEA ankoraŭ ne decidis ĉu okazigi kongreson en Gotenburgo aŭ ne. 2003 estas libera kaj konvena jaro por ni; nek tro frue ne tro malfrue por povi ĝin plani. Portugalio kaj Brazilo kandidatas por la jaroj 2001 kaj 2002. Reprezentanto de UEA venos en Gotenburgon venontjare por informiĝi.

Alia afero: En junio 2001 renkontiĝos en Gotenburgo la estroj de la registaroj de la Eŭropa Unio. En nia urbo svarmos i.a. EU-oficistoj. Por ni Esperantistoj ia aranĝo ĉirkaŭ tiu EU-renkontiĝo povus esti kvazaŭ antaŭekzerco al la mondkongreso. Kaj se la kongreso ne okazos la Esperantista EU-aranĝo estus tamen tre farinda.

Estas do du demandoj: la mondkongreso kaj la EU-aranĝo. Ili ne interdependas kaj ne okazus la saman jaron; supozeble pasus du jaroj inter ili. Kaj nia EU-aranĝo estus multe pli malgranda.

Kion ni povus fari ĉirkaŭ la EU-renkontiĝo? Seminario pri lingvoproblemoj? Praktikaj demonstroj pri la funkciado kaj uzateco de nia lingvo? Ekspozicio pri lingvaj rajtoj?

Kion vi opinias? Kiujn sciojn vi povus alporti? Venu al la renkontiĝo la 2-an de junio 18.30 en la klubejo.

Christer Lörnemark

***

Kära läsare!

Frågan om en världskongress i Göteborg har diskuterats något i föreningens styrelse och i Esperanto-Alliansens styrelse. Men diskussionen är inte slutförd, ett slutgiltigt beslut är inte fattat, och vi i styrelsen skulle vilja få fler åsikter om projektet från medlemmarna. Kommer det t.ex. att finnas tillräckligt många frivilliga?

UEA har inte beslutat om de ska förlägga en kongress till Göteborg. 2003 skulle vara ett ledigt och lämpligt år för oss; varken för tidigt eller för långt fram för att kunna planera kongres-sen. Portugal och Brasilien kandiderar för åren 2001 och 2002. En representant för UEA kommer till Göteborg nästa år för att informera sig.

En annan sak: I juni 2001 träffas EUs regeringschefer för ett toppmöte i Göteborg. I staden kommer det bl.a. att vimla av EU-tjänstemän. För oss esperantister skulle något slags arrangemang runt EU-toppmötet kunna vara som en förövning till kongressen. Och om inte kongressen blir av äger sannolikt toppmötet ändå rum, och ett esperantiskt arrangemang runt det vore väl värt besväret.

Det handlar alltså om två olika frågor: världskongressen och EU-toppmötet. De är inte beroende av varandra och kommer inte att ske samma år; de skulle då inträffa med två års mellanrum. Och vårt EU-arrangemang skulle bli mycket mindre.

Vad skulle vi kunna göra runt EU-toppmötet? Ett seminarium om språkproblem? Praktiska demonstrationer av hur vårt språk fungerar och används? En utställning om språkliga rättigheter?

Vad tycker Du? Vilka kunskaper kan Du bidra med? Kom till mötet den 2 juni kl. 18.30 i klubblokalen.

Christer Lörnemark

***

Pri la origino de vivo

Marde 14 aprilo faris nia klubano doktoro Svetlana Kotelnikova tre interesan prelegon pri la plej ĵusa esplorado pri kiel la vivo ekestis sur la tero. Ĉe Instituto por Mikrobiologio ĉe la universitato de Gotenburgo oni esploradas i.a. pri tiuj bakterioj, kiuj vivas profunde en la rokgrundo. Ĉi tiu esplorado nun altiris la intereson de alia esplorkampo, nome tiu pri la origino de vivo, ĉar oni kredas ebla ke la vivo ekestis en fendoj sube en la rokgrundo. Tre konvinke Svetlana klarigis kial ĝuste la rokgrundo estas ideala medio por la kreiĝo de vivo. Ŝi ankaŭ menciis la aferon pri la meteora ŝtono el la planedo Marso, en kiu kelkaj esploristoj kredas ke troviĝas fosilio de ekstertera vivo en formo de treege malgrandaj bakterisimilaj formaĵoj. La plej multaj esploristoj, kiel Svetlana mem, tamen dubas ke temas pri fosilio, sed pli kredas ke temas pri pure mineralaj formaĵoj.

Post la prelego la publiko povis fari demandojn. La renkontiĝo kolektis dudekon da aŭskultantoj.

Andreas

***

Om livets ursprung

Tisdagen 14 april höll vår föreningsmedlem doktor Svetlana Kotelnikova ett mycket intressant föredrag om den senaste forskningen kring hur livet uppstod på jorden. Vid Institutionen för Mikrobiologi vid Göteborgs universitet forskar man bl.a. om de bakterier som lever långt nere i berggrunden. Denna forskning har nu kommit i fokus från annat håll, nämligen från forskningen om livets ursprung, eftersom man tror det vara möjligt att livet uppkom i sprickbildningar nere i berggrunden. På ett mycket övertygande sätt förklarade Svetlana varför just berggrunden utgör en så lämplig miljö för uppkomsten av liv. Hon tog också upp fallet med den meteorit från planeten Mars, som ett par forskare påstår innehålla fossil av utomjordiskt liv i form av ytterst små bakterieliknande bildningar. De flesta forskare, liksom Svetlana själv, ställer sig dock tvivlande till att det rör sig om fossil, utan tror hellre att det endast är bildningar av mineralet självt.

Efter föredraget kunde publiken ställa frågor. Mötet samlade ett 20-tal åhörare.

Andreas

***

Bo gratis i Lesjöfors
Varför inte tillbringa några kreativa dagar på Esperanto-Gården?

Om ni kan ägna några timmar dagligen med att hjälpa till med sånt som behöver fixas på Esperanto-Gården, så bor ni där gratis. Maten fixar ni lätt själv i något av köken, mataffären ligger på andra sidan gatan. (Esperanto-Gården kan dock ej erbjuda gratis kost, vilket felaktigt anges av La Espero 1998:2.) Ring Lennart Svensson 0590/309 09 och fråga vad ni kan hjälpa till med.

Andreas

***

Senkoste loĝi en Lesjöfors
Kial ne pasigi kelkajn kreemajn tagojn ĉe la Esperanto-Domo en Lesjöfors?

Se vi povas dediĉi kelkajn horojn potage kunhelpante pri farendaĵoj je la Esperanto-Domo, vi loĝas tie senkoste. Manĝaĵojn vi facile preparos mem en unu el la kuirejoj, la manĝaĵa vendejo troviĝas ĉe la alia flanko de la strato. (La Esperanto-Domo tamen ne povas oferti senpagan manĝon, kio erare presiĝis en La Espero 1998:2.) Telefonu al Lennart Svensson 0590/309 09 kaj demandu pri kio vi povas kunhelpi.

tradukita de Christer

***

Ekskurso al Ragnhildsholmen
3 junio je h. 19.00
Kunportu piknikan korbon, birdan vortaron, belan veteron kaj la birdoliston ĉi-sube. Tiujn birdojn ni eble aŭdos kaj vidos. Sed ĉijare mi metis la tradukon en iom da malordo. Estos via tasko ĝuste parigi la nomojn de la birdoj.

1. fringo; 2. najtingalo; 3. granda paruo; 4. kolombo; 5. kantturdo; 6. flava emberizo; 7. kukolo; 8. merlo; 9. pigo; 10. alaŭdo; 11. sturno; 12. motacilo; 13. pego; 14. fitiso

Se vi ne aŭdos ĉiujn en la naturo certe Andreas aŭdigos kelkajn.

Gotenburganoj! Prenu la buson 39 ĝis la haltejo "Ragnhildsholmen". Inga informos pli, tfno 15 57 23.

Ĉiuj bonvenaj!

Märtha Andréasson

el la membrobulteno de la Esperanto-klubo de Kungälv, nro 2/1998

***

Utflykt till Ragnhildsholmen
3 juni kl. 19.00
Ta med picknickkorg, fågellexikon och gärna vackert väder, plus fågellistan nedan.

Fåglarna som nämns nedan får vi kanske höra och se. Men i år har jag placerat översättningen i lite oordning. Det blir er uppgift att para ihop namnen rätt på fåglarna.

1. domherre; 2. duva; 3. gulsparv; 4. bofink; 5. gök; 6. näktergal; 7. ärla; 8. hackspett; 9. stare; 10. lövsångare; 11. skata; 12. lärka; 13. ärla; 14. talgoxe

Om ni inte hör alla i naturen får ni säkert höra några av Andreas.

Göteborgare! Ta buss 39 till hållplatsen "Ragnhildsholmen". Inga informerar ytterligare, tfn 15 57 23.

Alla välkomna!

Märtha Andréasson

ur Kungälvs Esperanto-Klubbs Medlemsblad nr 2/1998

***

Kunveno pri eventuala mondkongreso en Gotenburgo
marde 2 junio 18.30 en la klubejo.

***

Möte om eventuell världskongress i Göteborg
tisdag 2 juni 18.30 i klubblokalen.

***

Begagnad dator
sökes till föreningen, gärna en Macintosh eller PC. Om Du känner till någon som vill sälja datorutrustning billigt (dator, skärm, skrivare), hör av Dig till ordförande eller sekreterare.

Christer

***

Uzita komputilo
serĉata por la societo, prefere Macintoch aŭ PC. Se vi scias pri iu kiu vendas komputilan ilaron malmultekoste (komputilo, ekrano, printilo), bv tion sciigu al la prezidanto aŭ la sekretario.

Christer

***

***

Korespondi deziras
psikologino 52-jara
Claudine Rade Dyel
3 bis. rue St Joseph
F-84000 Avignon
Francio

***

La Esperanto-Alianco de Gotenburgo
havis sian jarkunvenon la 25-an de marto. La jarraporto estis, kiel ĉiam, sufiĉe ampleksa. Ĉar la Alianca jarraporto spegulas la tutan Esperanto-agadon en kaj ĉirkaŭ Gotenburgo multo en ĝi ankaŭ troviĝas en la jarraporto de Esperanto-Societo, kiun vi povis legi en la antaŭa numero de inter-LIGILO.

Post la jarkunveno la estraro aspektas jene: Märtha Andréasson (prez.), Margareta Andersson (kasisto), Inga Johanson, Andreas Nordström, Majken Svensson. La tri lastaj dividos inter si la restantajn postenojn. Anstataŭantoj estas Christer Lörnemark kaj Kent Grahn.

Christer

***

La Nilsona Fonduso
(Textilarbetare E. S. Nilssons ideella fond) aĉetadas librojn kaj fonogramojn kaj ankaŭ abonas revuojn por starigi Esperanto-bibliotekon en Gotenburgo. Parto de la libroj deponiĝas en la Urba Biblioteko (ĉe Götaplatsen).

Libretoj/kajeroj, libroj de limigita ĝenerala intereso, sonkasedoj kaj videokasedoj troviĝas en la klubejo kaj prunteblas tie. La Fondusaj libroj deponitaj en la Urba Biblioteko troviĝas en la dua etaĝo tie, sub la Sveda biblioteka kodo Fy (tiu "fia" kodo signifas "artefaritaj lingvoj"). Nun 644 el niaj libroj estas deponitaj en la Urba Biblioteko; al tio aldoniĝas 189 libroj kiujn la urbobiblioteko mem posedas. (Dum la jaro la urba biblioteko de Falun donacis 230 librojn al la Gotenburga Urba Biblioteko. El tiuj libroj 41 doniĝis al la Nilsona Fonduso.) En la komputila katalogo de la Urba Biblioteko nun troveblas 661 E-libroj.

Revuoj abonataj: *Esperanto, Eventoj, Kontakto, Literatura Foiro* kaj *Monato*. La revuoj troviĝas en la klubejo.

La komitato por la Nilsona Fonduso konsistas el: Ebbe Vilborg (prez.), Kent Grahn (kasisto), Christer Lörnemark (sekr.); anstataŭantoj Inga Johanson kaj Andreas Nordström. La komitato elektiĝas dum la jarkunveno de la Esperanto-Alianco de Gotenburgo, kaj respondecas al tiu organizo.

Christer Lörnemark

***

Sommarstängt

Klubblokalen är officiellt stängd under tiden 16 juni–18 augusti. Möten kan dock komma att hållas ändå, men inte lika regelbundet som annars. Om en utländsk esperantist gästar oss och vi kan ordna ett möte med honom / henne utgår meddelande till *Rapida Informilo*-s prenumeranter.

Styrelsen

***

Somere fermita

La klubejo estas oficiale fermita dum la tempo 16 junio–18 aŭgusto. Renkontiĝoj tamen okazos, sed ne tiel akurate kiel ordinare. Se eksterlanda Esperantisto gastos nin kaj se ni povos aranĝi kunvenon kun li/ŝi elsendiĝos numero de *Rapida Informilo* al ties abonantoj.

La estraro

***

Tradukemuloj serĉataj

Kiu volas partopreni tradukan studrondon aŭtune? Sciigu vian intereson al Christer Lörnemark, tfno 41 26 53.

***

Esperantokurserna vid Karlskoga Folkhögskola

Sedan 1988 har vi undervisat elever från 38 nationer på våra Esperantokurser. Den här hösten deltog 6 nationaliteter – från Sverige, Danmark, Norge, Zimbabve, Japan och Kina.

Varje vecka studerar man Esperanto 20 lektioner i klass och 4 lektioner i språklaboratorium. Undervisningen är helt på Esperanto. Redan efter 2–3 veckor kan eleverna göra små berättelser och skriva korta uppsatser och redan efter en månad samtalar de med klasskamrater vid

matbordet. Vår kines Basheng Chen visade vid ett samkväm för förvånade elever och i svensk TV,. att han efter 4 månader flytande kan tala Esperanto. Jag beklagar verkligen, att skolmyndigheter och politiker inte vill informera sig om detta.

Esperanto kunde propedeutiskt spela mycket stor roll vid språkinlärning, något som har visats i olika skolor. Vid nyligen gjorda tester i tre europeiska länder visades att Esperantoelever i genomsnitt lyckades 30–35 % bättre än sina kamrater vid studier i tyska och engelska.

I december besökte TV 2 vår linje och gjorde program om studierna och eleverna. Efteråt visade man programmet i "Landet Runt" och människor från den nordligaste delen av Sverige till Köpenhamn i Danmark i söder skrev till oss. Intresset för Esperanto och våra kurser blir allt större, säkert mycket tack vare de 5 programmen om Esperanto i Utbildningsradion, som sändes åtskilliga gånger i olika radiokanaler. [...]

Mycket kring Esperanto händer i världen. I Sverige *blev det första gymnasiet med Esperanto-undervisning Huskvarna och i Helsingborg studerar redan ett tjugotal elever*, som nästa år har rätt att ha Esperanto som officiellt ämne. Många ungdomar anmäler sig till kurserna i Karlskoga, mycket tack vare Utbildningsradions program. Till kommande höst inbjuder vi till en helterminskurs på 16 veckor.

På olika håll vill man ha information. Bl.a. så vill man vid *ekonomiska fakulteten vid Umeå Universitet och språkliga fakulteten vid Örebro Universitet ha föreläsning om Esperanto.*

Men Esperanto-rörelsen blir inte större av sig självt. Ni kan med pengar stödja verksamheten i Karlskoga och Lesjöfors, resa till Lesjöfors över ett veckoslut med vänner för att hjälpa till eller uppmana vänner, arbetlösa, ungdomar o.a. att deltaga i kurser. [...]

Lars Forsman

[utdrag ur informationsmaterial från Karlskoga Folkhögskola]

***

Ŝerco

Kapitano kriis al unu el siaj maristoj:
"Petro, kion vi faras nun?"
"Nenion, kapitano."
"Kaj Karlo, ĉu vi ankaŭ faras nenion?"
"Ne, mi helpas Petron, kapitano."

***

Läs GP och Arbetet!

Vissa större möten brukar vi annonsera i "Göteborg Idag" i Göteborgs-Posten och dess motsvarighet "PåGång Idag" i Arbetet. Du brukar väl se efter i dessa spalter?

***

Låna gärna esperantoböcker på Stadsbiblioteket!

***

Agrablan someron!
Trevlig sommar!
deziras al vi la redaktantoj